Año IV (N.° 38)

# BOLETIN

DE LA FEDERACION ESPERANTISTA ESPAÑOLA

Núm. 2

FEBRERO 1952

RUZAFA, 7
VALENCIA
(ESPAÑA)

ARKAIKA RIMEDO NE UTILAS, KIAM EKZISTAS PERFEKTA METODO

Nun, sub la signo de teknika progreso, en la epoko de la penicilino, voli kuraci per kataplasmo inflamon de la pulmo estus tre absurda afero, se ne plej stulta ago...

## DE LA GRAMÁTICA A LA ÉTICA

Todo aquél que, movido por simpática curiosidad, se interesó por la maravillosa estructura del Esperanto y quedó convencido de su perfección, ha ido comprendiendo cada vez más la íntima satisfacción que produce el conocimiento del idioma auxiliar, y los múltiples goces que proporciona el poder conversar fácilmente con personas pertenecientes a diferentes razas, a diferentes pueblos y a diferentes naciones del mundo.

Y, poco a poco, por medio del hermoso idioma neutral, sin tener que sufrir el duro vasallaje de balbucear un lenguaje que domina el interlocutor se establece, de igual a igual y sin plataformas de privilegio, el intercambio lingüístico, ideario y afectivo, que convierte, de hecho, a los esperantistas de los diversos países, en verdaderos hermanos.

Esta es la consecuencia social de un simple hecho lingüístico, que ya previó—y deseó— el genial fundador del Esperanto, y que, lejos de alterar la simplista y seca concepción del idioma auxiliar, le complementa y dignifica, hasta elevarlo a la condición de efectivo instrumento de paz y símbolo de unificación mundial para la gran familia humana.

Toda la vida del creador de nuestra hermosa lengua se empleó en dar a la humanidad un medio eficaz para guardar la paz. Si bien el resultado inmediato de tal invento no ha sido definitivo, por la apatía de individuos y gobiernos, el hecho concreto es que de una manera tangible, aquellos que se decidieron a emprender el estudio del Esperanto y llegáron a usarlo corrientemente, llegaron a infundir en su espíritu un fondo de bondad, tolerancia y altruismo, que constituyen, desde luego, una credencial de alta valoración moral y social. Esta es la primera e innegable conquista del Esperanto, que, antes de dignificar a los pueblos, comienza por elevar el fondo moral de los individuos. Y este hecho es tanto más valioso cuanto que, actualmente, el mundo está sufriendo una aguda crisis, no sólo de la moral, sino también de la moralidad, que no son exactamente la misma cosa. Por ello, todo cuerpo de doctrina o ideario que lleve aparejado, de una manera básica, los principios de la más alta moral objetiva, han de ser saludados con alborozo por toda persona de recta intención, buena voluntad y sanos principios.

De ahí nuestra machaconería, repitiendo desde esta tribuna qne, sin desorbitadas exageraciones, sin poner a nadie en un altar, rechazando todo misticismo y, aún más, todo mesianismo, permaneciendo cada vez más sobre el suelo de la realidad, hemos de aceptar, sin embargo, que el esperantismo está constituído, no solamente por una gran comunidad lingüística sino por una familia moral, en el más amplio sentido de la palabra.

Todo esperantista sabe perfectamente que, aún siendo políglota, al salir de su país, tan sólo encontrará protección y afecto, entre los esperantistas de todas aquellas ciudades que vaya visitando. Y esta es la mejor demostración de nuestro aserto.

...Tamen, ignorante la ekziston de Esperanto, oni volas solvi la problemon de la internacia komprenebleco per la galimatio de multlingva koncerto, kun erara interpretado!

# HISPANA KRONIKO

**MANRESA.**—La 21an de pasintjara Decembro, en luksa salono de ĉi tiu bela kaj grava kataluna urbo, okazis la solena fermo de la aŭtuna kurso, kiun sukcese aranĝis la Esperanto-fako de kultura societo «Lingua Club». La kurso estis daŭre anoncata de la urbaj gazetaro kaj radio; la skabeno pri kulturo multe favoris la funkciadon de tiu kurso, kiun S-ro Saumell Vilá klarigis laŭ la rekta metodo, kun amasa ĉeesto (pli ol cent personoj) kiuj sekvis ĝin kun vigla intereso. En la ferma festo, la konata tenoro Emilio Vendrell disertis pri kanzonoj; kaj, ĉe la fino, li kantis en Esperanto la ĉarman kanzonon «Minueto», kiun tradukis la karmemora poeto J. Grau Casas. La semo, do, trovis bonan grundon! Kaj, espereble, la rikolto ankaŭ estos bona.

**MOYA.**—En ĉi tiu klera vilaĝo de Barcelono, nia movado kreskas pli kaj pli, dank' al lerta gvidado de S-anoj Solá, Molera kaj Vives, kiuj, kune kun aliaj kvazaŭ densa grapolo en efika unueco, aspiras konkeri la tutan urban junularon por nia afero, al kio certe tre multe helpos la Ekspozicio, kiun ili preparas kun materialo ricevita de la tuta mondo. Nun funkcias elementa kurso en la ejo de LA TOSCA, tiea monata gazeto, kiu konstante aperigas tre favorajn artikolojn por nia kara idealo.

**CIAÑO SANTA ANA.**—Jen ĉarma vilaĝo, en la ĉarma Asturio, norde de la lando, kiu vekiĝas kaj strebas al la unuaj lokoj de la hispana esperantismo. La animo de tiu reviglîĝo estas nia bona amiko Alcibiades González, kiu klarigas kurson al dudek lernantoj. Krom tio, tri urbaj *veteranoj* ĉeestas en perfektigaj lecionoj, kun la celo povi plej baldaŭ debuti, kiel instruantoj de multaj eventualaj lernantoj.

Krom la antaŭaj informoj, laŭ plej freŝaj sciigoj, okazas ankaŭ kursoj en sekvantaj societoj aŭ institucioj: Kooperativo «Paz y Justicia» en Barcelono. Kultura Fako de Ekskursa Societo «Puigcastellar» en Santa Coloma de Gramanet. Akademio ALMI en Alcoy. * Regiona Societo «Centro Aragonés» en Bilbao.

**AKADEMIO DE ESPERANTO**
**Adreso: Oostduinlaan 32, Hago, Nederlando**

# OFICIALAJ INFORMOJ ★

Post la okazintaj elektoj de la Direktoroj de la Sekcioj de la Akademio de Esperanto, la Estraro nun konsistas el la sekvantaj personoj:

*Prezidanto:* Ir. J. R, G. ISBRUCKER, Oostduinlaan 32, Den Haag, Nederlando.

*Vicprezidantoj:* A. CSEH, Riouwstraat 172, Den Haag, Nederlando. D-ro E. PRIVAT, Evole 3, Neuchâtel, Svisujo.

*Direktoro de la Sekcio por la Gramatiko:* D-ro W. LIPPMANN, 1021 East 14th Street, Brooklyn 30 (N.Y.), Usono.

*Direktoro de la Sekcio por la Literaturo:* G. AVRIL. 60 Boulevard Auguste Raynaud, Nice (A. M.) Francujo.

*Direktoro de la Sekcio por la Ĝenerala Vortaro:* Prof. G. WARINGHIEN, 7 Avenue Léon Gourdault, Choisy-le-Roy (Seine), Francujo.

*Direktoro de la Sekcio por la Teknikaj Vortaroj:* J. OKAMOTO, 2435 Sinobi-cho Ueno, Mieken, Japanujo.

*Direktoro de la Sekcio por la Bibliografio:* D-ro P. NEERGAARD, Gothersgade 158, Kobenhavn-K, Danujo.

La taskojn de la Ĝenerala Sekretario-Kasisto provizore plenumas la Prezidanto, kun helpo de la Internacia Esperanto-Instituto.

Ir. J. R. Gr ISBRUCKER, Prezidante.


# XIII CONGRESO ESPAÑOL DE ESPERANTO

**26 - 27 - 28 - 29 de Julio de 1952 en VALENCIA**

**Es de suponer que todos los abonados ya habrán recibido la hoja de inscripción y que se apresurarán a cumplimentarla, para que los organizadores puedan contar con una base inicial de adheridos. Para orientar, damos una relación con las tarifas que rigen en los hoteles y pensiones de Valencia:**

| | | | |
|---|---|---|---|
| **Hotel de 1.ª, a toda pensión:** | **150 pesetas.** | **Solo dormir, por persona:** | **50 pesetas** |
| **» » 2.ª, » »** | **110 »** | **» » » »** | **40 »** |
| **» » 3.ª, » »** | **75 »** | **» « » »** | **35 »** |

**Además, hay pensiones más modestas, pero bastante confortables, donde puede disponerse de pensión completa por 45 pesetas y dormir por 20 pesetas. A estos precios hay que aumentar el 12 % para el servicio y el 25 % por el recargo legal, con motivo de la Feria valenciana durante esos días. Se están haciendo las debidas gestiones para lograr tarifas más reducidas sin recargo alguno, en casas particulares**

Pueden consultarse por correo los casos particulares que se presenten y que serán seguidamente atendidos. Solicitad más hojas de inscripción para familiares y amigos, pero ante todo apresuraos a enviar vuestra valiosa adhesión al

**COMITÉ ORGANIZADOR del XIII Congreso Español de Esperanto**

**Pelayo, núm. 7, 1.° — Teléfono 19532 — VALENCIA**

# FACETAS DEL MOVIMIENTO ESPERANTISTA

● NORUEGA.—La obra capital de Henrik Ibsen, «Peer Gynt», acaba de ser traducida al Esperanto, con grandes alabanzas de la crítica por su perfección y fidelidad.

● SUECIA.—El señor Harry Nilsson, quien visitó España en 1950, ha pronunciado en Esperanto tres charlas sobre nuestro país, en tres distintos clubs de Malmo y Lund, que ilustró con numerosas proyecciones y fotografías, obtenidas durante su viaje, a cuyo feliz resultado llegó por la ayuda que le fué prestada por numerosos samideanos españoles.

● DINAMARCA.—«Studenta Esperanto-Klubo», de Hobenhavn, ha llevado a cabo una exposición esperantista en la Universidad, mostrando en forma gráfica la utilidad del idioma auxiliar para las relaciones científicas internacionales. Resultado de la exposición, dado el interés demostrado por los universitarios daneses, ha sido haberse abierto dos cursos simultáneos, donde asisten gran número de estudiantes y algunos profesores.

● CHECOSLOVAQUIA.—En la ciudad de Bohumin se ha inaugurado la «Alameda Zamenhof», via que conduce desde el parque principal hasta el centro de la población, donde hay erigido un monumento al Esperanto, en reconocimiento a su valor cultural.

● ALEMANIA.—En el próximo mes de mayo se celebrará el 4.° Congreso Internacional de Ferroviarios Esperantistas. La Federación cuenta ya con varios millares de miembros en 16 países; en Alemania, dicha asociación merece mucho apoyo de la Administración Federal de Ferrocarriles; en Holanda y Francia existen organizados muchos grupos de ferroviarios esperantistas; en Italia se ha constituído recientemente la Asociación nacional. El Esperanto es, pues, un instrumento utilísimo a favor del ferroviario, elemento social tan ligado internacionalmente por problemas comunes, técnicos y de organización.

● SUIZA.—En la Escuela Normal de Hitzkirch se está llevando a cabo un curso del idioma auxiliar entre los estudiantes del magisterio, a fin de facilitar el medio de que el Esperanto llegue paulatinamente a la infancia en forma suave y natural.

● ITALIA.—«L'Osservatore Romano» del 23 de septiembre de 1951, publicó un detallado artículo del señor Gabriele M. Roschini, sobre «Il Beato Pio X e l'Esperanto».

El 26 de enero se ha reanudado un curso del idioma auxiliar en la Universidad Popular de Roma; la apertura estuvo a cargo del profesor Canuto, rector de la Universidad de Parma, y el curso es explicado por el competente esperantista Padre Carolfi O. F. M.

● YUGOSLAVIA. — *Ni obeigos la akvon* (haremos que el agua obedezca), mostrando las obras hidráulicas construídas y en construcción, es un film con banda hablada en Esperanto, el cual se cede gratuitamente por los consulados en el extranjero, para su proyección, a las entidades culturales y profesionales que así lo soliciten.

● JAPON.—En diversas revistas científicas es frecuente la publicación de artículos con resúmenes en Esperanto. Ultimamente ha sido en «Embryologia», de la Universidad de Nagoya, en la «Revista Nipona de Fisiología» y en el Boletín de la Facultad de Agricultura, de la Universidad de Yamaguchi, donde cuenta con muchos adeptos.

● ESTADOS UNIDOS.—«Mail Chess», órgano de la Federación Internacional de Ajedrez por Correspondencia, edita regularmente artículos en inglés, francés, alemán y Esperanto.

● PARAGUAY.—También la firma «El Mundo Paraguayo», de Ciudad Coronel Bogardo, ha publicado «Revista Filatélica Paraguaya» en cinco lenguas nacionales y en Esperanto.

## UN ERROR DE TRADUCCIÓN PERJUDICÓ LA MISIÓN DE JUIN EN ESTADOS UNIDOS

*En un artículo publicado en «Levante», diario regional de Valencia, con fecha 22 de Enero último, puede leerse lo siguiente:*

**«A su llegada a esta capital (Washington) el general Alphonse Pierre Juin, dijo que venía en busca de la ayuda norteamericana para hacer frente al peligro de Indochina, y que estaba decidido incluso a «demander» a los Estados Unidos que envíen tropas a aquel frente. Sabido es que la palabra «demander» significa pedir, solicitar, y en inglés esto se expresa con el verbo «to ask». Pero los reporteros norteamericanos tradujeron la palabra «demander» por «demand», que es un sinónimo de «request», y que significa exigir. Naturalmente, los círculos de Washington pusieron el grito en el cielo...»**

***Para nosotros, los esperantistas, no hacen falta comentarios.***

*Okaze de la 35ª Internacia Eŭkaristia Kongreso, en Barcelono, dum la proksima printempo, ĉiuj katolikaj samideanoj, precipe pastroj kaj ceteraj esperantistaj religiuloj, estas petataj sin turni al la Organiza Komitato, petante la enkondukon de Esperanto en la laborkunsidojn de tiel grava solenaĵo.*

***Krome, ĉiu esperantisto, jam aliĝinta aŭ aliĝonta al tiu kongreso, bonvolu anonci sin al la speciala delegitino: F-ino María Jung, Avda. José Antonio, 470 - Barcelono***

En superjaro, kiel estas la nuna jaro, oni vivas unu tagon pli. Kaj tiu donaco, kiun la kalendaro faras al la homoj, iĝas efektiva ĝuste nun, kiam, kvazaŭ ŝtupo de fantazia ŝtuparo, ĉiu tago de Februaro kondukas, pli kaj pli proksimen, al la regiono de la milda varmo. Februaro estas modesta monato, ĉar plej eta ido ĝi estas en la jara familio. Oni kutime ĝin akuzas je variema karaktero, ne konsiderante antaŭe, ke etuloj emas ja petoli... Tamen, rekte spertante la bonan influon, kiun ĝia mallonga regado havas ĉe la homoj, tre simpatie mi rilatas al ĝi: Se ne jam printempo, almenaŭ averto ĝi estas por la vintra rigoro, ke pli forta rigoro neniel plu eblos; kaj tio per si mem efikas karese, kiel gaja promeso de krevantaj burĝonoj, en eksplodo de koloroj kaj parfumoj. Emblemo de iluzio, do, ĝi ankaŭ estas laŭ tiuj skeptikaj filozofoj, al kies skolo ŝajne mi apartenas, kiuj paradokse asertas, ke, pro manko de bela ideala realo en la mondo, nur valoras fakte la daŭra revado al tiu forfluga—vere ne ekzistanta—realo de justo, konkordo kaj belo... Nu, se Februaro ludas aŭ grimacas: jen per pluvo, jen per neĝo, ankaŭ kompense ĝi donas, kvankam sporade, dum pli malpli multe da tagoj, fonon el pura lazuro fendota — espereble tre baldaŭ! — de la nigrebluaj sagoj de unuaj hirundoj.

Profitante la lumon de unu el tiaj momentoj, taŭga por utila laboro, vigle mi kaŭras antaŭ amaseto da gazetoj restintaj de mia pasinta kroniko; kaj, kvazaŭ normala daŭrigo, titoloj sekvas titolojn denove en parado, laŭ jena maniero:

Hodiaŭ aperas ĉefronte du enlandaj periodaĵoj, tre simpatiaj kolegoj, kiuj multe helpas nian movadon en Katalunio: LINGUA CLUB, bulteno de grava poliglota societo en Manresa, kie Esperanto estas elstara fako, povas esti modelo de

# INTER LA PROZO DE LA

arta kaj plaĉa informilo; ĝi estas pli bela kaj loga ol multaj similuloj en grandaj ĉefurboj. LA TOSCA, urba heroldo de Moyá, kie nia lingvo pompas kaj floras, regule aperigas rubrikon, kiu oportune helpas la klopodojn de la lokaj pioniroj; mi ne povas ne gratuli ilin, kiuj estas ekzemplo montrinda pri tio, ke ne nur oni devas labori, sed trafe labori! Sen atento al la baro de la Pirineoj, fluas al mi lavango da francaj gazetoj, sub ĝentila prezido de FRANCA ESPERANTISTO, ĉiufoje pli legebla kaj leginda. LA FERVOJISTO, redaktata de la bona amiko Guy Delaquaize, glitas sur lerte ordigitaj reloj, same kiel ĝia samfakano: BULTENO de la Internacia Federacio de Esperantistaj Fervojistoj, kiuj deĵorante en ĝojbrue fajfantaj lokomotivoj emas al la rapideco en la varbado de novaj adeptoj. ESPERANTISTA LABORISTO, organo de la franca laborista Federacio, estas kuraĝa admonanto, pri socipolitikaj temoj, svingante klaran lingvon per klara lingvaĵo, sur bona papero kaj bela tipografia aranĝo. AMIP estas

## LITERATURA

**OKAZE DE LA XIIIª HISPAN**
**EN VALENCIA (26-2**

Al ĉiuj samideanoj, kiuj, per prozo aŭ per ver
lingvo, Hispana Esperanto-Federacio sendas pl
la turniro de ĉi tiu Literatura Konkurso, kie
verkojn ricevitajn de ĉiulandaj aŭtoroj,

1.ª (Verso) **Lirika poeziaĵo,** originala a
2.ª (Prozo) **Mallonga novelo,** originala

La unua premio, por ĉiu el ambaŭ temoj
tabuleto, juvele prilaborita, kie oni gravur
la koncerna diplomo, kiun ankaŭ

Ĉiuj verkoj estu nepre nepublikigitaj, en
al alia simila konkurso. La tradukoj de
Oni sendu la materialon, kun tre klara
per rekomendita poŝto, ne pli malfrue ol

**ORGANIZA**
**XIIIª HISPANA KONG**
**(LITERATUR**
**Pelayo, num. 7, 1.º**

# ESPERANTISTA GAZETARO

anagramo de esperantlingva informa bulteno, en Parizo, pri la mondcivitana movado. En SAT-AMIKARO, la titoloj de preskaŭ ĉiuj artikoloj havas magnetan forton; jen du el ili: «La dulingveca sistemo» kaj «Propraj nomoj en la praktiko», ili ambaŭ sufiĉas por doni al ĝi kategorion de altranga revuo. ORA ULEKSO estas iomete stranga nomo por la bulteno de Grupo «Libero-Laboro» en la konata urbo Rennes; mi scias, kiel malfacile estas varti similajn klubajn informilojn; pro tio, oni devas ĉiam rigardi ilin kun viva simpatio. ESPER-NANTA GAZETETO, jen alia eta bravulo en Nantes, la historia urbo; ĉi tiu kolegeto estas kvazaŭ trilanta pasero, tra la densa foliaro de nia tuta gazetaro. Kvankam tre malgranda, ĝi havas spacon por lertaj kaj spritaj kontribuoj. LA FOLIETO, organo de la juna esperantistaro en la Pariza regiono, fermas la liston da ŝatataj nordaj najbaroj. Kelkaj el ili estas tre modestaj, sed ilia ekstera modesteco ne povas kaŝi la puran oron, kiu hele brilas interne. VERDA STELETO, monata informilo de Centra Esperanto-Oficejo en Torino, estas agrabla kajero de itala rondo el kompetentaj aktivuloj, kiuj scias la arton pri harmonia distribuo de la tekstoj. Estas precipe interesa la kompilo de ELEKTRA TERMINARO, speciale utila por tiuj, kiuj interesiĝas pri radiofonio; krom tio, literaturaj pecoj kaj ceteraj informoj kompletigas la enhavon. Jam de tre multa tempo regas silento, en mia rubriko, pri la aŭstriaj kolegoj; mi petas pardonon al ili, prezentante freŝajn nomojn: INFORMLETERO, monata folio por la grupoj en Tirolo kaj Vorarberg, venas al mi blovata de la sana vento el imponaj montegoj. Sur la fronta paĝo krietas alvoko: «La nova jaro en la signo de l' Zamenhof-Monumento!» Jen ĝojiga fakto baldaŭ efektiviĝonta; jes, la aŭstria kanceliero mem, D-ro Figl, ĉeestos la inaŭguron (27. de venonta Julio) sur placo de la juna urbo Wörgl; antaŭ tiel brila sukceso, decas unuanima aplaŭdo. LA SPEGULO estas revuo de la landa organizo por Supra Aŭstrio; en la jarfina numero, okupas grandan spacon aroganta projekto pri konstruado de Esperanto-Hejmo, kiu sin montras per skemoj kaj planoj. En la enkonduko, oni diras: «La vojaĝproblemo altrudas nin la zorgojn, kiel gastigi niajn geamikojn, kiuj venos de eksterlando por viziti nin kaj nian belan landon». Kaj, puŝataj de ega fervoro, ili studas la manieron efektivigi la ideon. Mi simple pinĉas la titolajn vortojn: «Kial konstrui tian hejmon, kial ĝi estu tiel ampleksa, kiel uzi la domegon kaj, fine, kiamaniere akiri la necesan monon?» Jen tiklaj demandoj, kiuj, se malfacile respondeblaj, taŭgas almenaŭ kiel specimeno de grandioza entrepreno... kiu situas ankoraŭ, tra vaporozaj vualoj, en etapo de iluzio.

Sed, kio do pli bela? Jen, verŝajne, naiva demando de LA LEGEMA KOBOLDETO

*Nepre, oni estu preta ĉiumerkrede por aŭskulti la interesan programon* ANTENO ESPERANTISTA, *kiun Radio* S. E. U. *elsendas akurate je la 20'30 laŭ hispana oficiala horo (19'30 en Greenwich) per mallonga ondo de 42'05 metroj kaj 7140 kilocikloj.*

*La programo konsistas el raportoj, informoj kaj pecoj el folkloro en Esperanto; por la neesperantista aŭdantaro estas klarigoj kaj komentoj hispanlingvaj, kun freŝaj sciigoj pri nia tuta movado, enlanda kaj eksterlanda.*

## KONKURSO

**[...] KONGRESO DE ESPERANTO**
**[...]-28-29 JULIO 1952)**

[...]so, emas kulturi la beletron en nia internacia [...]ej koran saluton, invitante ilin verve konkuri en [...]elaj premioj atendas rekompenci la plej trafajn [...]kiuj povas partopreni laŭ jenaj reguloj:

[...]ŭ traduka kun libera elekto pri rimo aŭ metriko.

[...]ŭ traduka kun libera elekto pri stilo kaj temo.

[...]estos ligna ŝildo, arte tajlita, kun arĝenta [...]os la nomon de la premiita aŭtoro, krom [...]ricevos ĉiuj postsekvaj premiitoj.

[...] la senco, ke ili ankoraŭ ne estas senditaj [...]as kunporti kopion en la originala lingvo. [...]ndiko pri nomo kaj adreso de ties aŭtoro, [...]la 15ª de Junio, al la ĝenerala adreso de la

**KOMITATO**
**[...]RESO DE ESPERANTO**
**[...] KONKURSO)**
**VALENCIA (Hispanio)**

## DU AŬTENTIKAJ ANEKDOTOJ

*Oni kutimas diri: «Se non é vero, e bene trovato». Nu, haltu, skeptikaj homoj! Tiu, kiu nun skribas, povas certigi la veron de jenaj du okazintaĵoj, kiuj sekvas:*

Dum la unua mondmilito, mi volis iri Burdeon; kaj mi skribis al samideano Tzarevsky pri mia intenco. Senprokraste, mi ricevis afablan respondon, kune kun rekomendo por samideano loĝanta en tiu urbo. Antaŭzorge, S-ro Tzarevsky informis min detale pri la karaktero de mia eventuala kaj dezirata protektonto.

«Kiel filo el riĉa rusa familio—li diris—li estas treege bonedukita persono, kiu parolas Esperanton tre flue kaj korekte; sed... bedaŭrinde, li ne estas tre agema. Li sperte ludas fortepianon, kaj mi ne dubas, ke, en la unua okazo, li aŭdigos ĝin al vi».

Efektive, tuj post la prezento, la rusa samideano diris al mi respektoplene:

—Sinjoro Vigo, eksidu iomete, mi petas.

Kaj subite li komencis ludi partituron de famkonata komponisto. Kiam li finis, li staris kaj delikate alkondukis min ĝis la pordo, kie afable ridetante li diris:

—Diru al nia komuna amiko, ke mi agis tute akorde, laŭ lia supozo.

Jam sur la strato, mi konsideris, ke nur bela muziko ne solvas miajn aferojn, tiam mi metis la manon en la poŝon, kaj tie mi trovis ruslingvan leteron. El la du leteroj de S-ro Tzarevsky, mi donis la mian!...

* * *

Franca samideano Donés, el Montréjean, prezentiĝis en Pamiers (Francio) por min koni. En la hotelo, ni ambaŭ nur interparolis esperante. La mastrino kaj la klientoj interesiĝis por koni tiun personon.

—Li estas eksterlanda princo, mi diris al ĉiuj, montrante fieran mienon. Tia ŝerco multe plaĉis al mia amiko, kiu volonte helpis min en la ludo per fanfaronema sinteno. Sed, kiam li foriris, mi estis devigata pagi al la mastrino *princan* fakturon.

Sekve, tuj mi prenis plumon kaj skribis al samideano Donés jenajn vortojn:

—«Se okaze alian fojon vi venas sen antaŭa averto, bonvolu vin vesti kvazaŭ ĉifonaĵisto. Mia modesta salajro ne permesas al mi rilatojn kun aristokratoj!»

**J. VIGO MESTRES - Almatret (Lérida)**

AMI ESTAS KOMPRENI.

*Leonardo de Vinci*

## SFINKSA ANGULETO

**PARO DA ROMBOJ**

| SUBSTANTIVA | ADJEKTIVA |
|---|---|
| x | x |
| x x x | x x x |
| x x x x x | x x x x x |
| x x x | x x x |
| x | x |

Anstataŭigante la signetojn per literoj, oni povos legi horizontale kaj vertikale:

| | |
|---|---|
| vokalo | vokalo |
| unuo de elektra rezistanco | korinklina |
| manko de lumo | malagrabla |
| metalo | metalo |
| vokalo | vokalo |

Oni akceptos la solvojn, kun rajto al premio, ĝis 20. Marto

SOLVO DE LA **KVARTETO DA LITEROJ**
EN LA PASINTA NUMERO

**MO NO PO LO**

**LOLO - MONO - POMO - POLO - NOMO**
**POPO - MONOMO - POPOLO**

## LA VULPO KAJ LA KOKINO

**Fablo de SAMANIEGO**

*Foje, malsata vulp', al ĉas' volante,*
*en serĉo jam de longe kaj konstante,*
*profitante la ombrojn de la nokto,*
*kikerikon ekaŭdas apud korto.*

*Kaŭranta, scivoleme kaj sen bruo,*
*ĝi sukcesas alveni kontraŭ truo.*
*Ĝi flaras, kaj: «Antaŭen!» ĝi ekdiras,*
*kaj la kokinejon tuj ĝi eniras.*

*Malkovrante kokinon en angulo,*
*ĝi ja pensas: Jen estas malsanulo,*
*vidante, ke klopodas tia besto,*
*sensukcese, forflugi el la nesto.*

*Tiam la vulp', per voĉo ne tre klara,*
*demandas: «Kiel vi fartas, mia kara?*
*Ĉu estas vi malsana, ho, kompatinda?*
*Mi kredas, ke vi estas ja helpinda!»*

*«Tre - diras la kokin' - en ĉi-momento,*
*sed se vi malaperos, la kontento*
*al mia korp' revenos kun la sano;*
*mi neniel bezonas vian manon!»*

*Povas esti, ke niaj malamikoj*
*sin prezentas al ni, kvazaŭ amikoj;*
*sed al parol' ilia hipokrita*
*respondu ni per voĉo plej ŝirita:*

*«Mi fartas tre malbone ĉi-momenton;*
*sed se vi malaperos, la kontento*
*al mia korp' revenos kun la sano;*
*mi neniel bezonas vian manon!»*

*Tradukis* Alcibiades GONZALEZ MEANA
**Ciaño - Santa Ana (Asturio)**

**LA NEKONATINO** de Reinhold Conrad Muschler. El la germana lingvo tradukis Ludwig Goppel. Eldonejo Limburger Vereinsdruckerei, Limburg. 19'5 x 12'5 cm. 66 paĝoj. Prezo: broŝ. 2 gmk. bindita: 3 gmk. plus 10 % por afranko kaj pakaĵo.

Salutinda estas la unua esperanta verko de germana eldonejo! ĝia bela kaj blanka eksteraĵo jam avertas pri delikata enhavo. Tamen ne nur delikata, sed ankaŭ ege kortuŝa kaj plene romantika estas la temo de ĉi tiu novelo en kiu la aŭtoro ĉizas, per ĝustaj kaj simplaj vortoj, idilion inter provinca franca fraŭlino kaj eleganta angla lordo, kiuj en amika akompano veturas ĝis Parizo, sekvante la fluon de siaj diferencaj vivoj, hazarde kunligitaj de la destino, por nur kelkaj tagoj. Unuavide, tio aspektas kvazaŭ vulgara rozkolora amrakonto; sed ne, tute ne! ĝia klara stilo kaj agrabla formo liveras specialan ĉarmon, kiu revivigas, ĉe la leganto, subtilajn aromojn de poemo en la propraj intimaj rememoroj.

La heroino atingas la kulminon de sia ekstazo: «Ĉio estas neeldireble bela!» kvankam ŝi ja scias, «ke subite eksonos vekhorloĝo... kaj ĉio estos nur sonĝo!» Frivola medio ŝin envolvas, kvankam: «ĉiuj homoj estis fremdaj. Por ŝi ekzistis sole nur unu homo, kaj tiu homo forvojaĝos post kvar tagoj al Egiptujo». Jes, tien fine li iras, renkonte al sia oficiala fianĉino. Tion dekretis la fatalo, kaj tion antaŭe ŝi jam sciis, ĉar la juna diplomato tute lojale kondutis al la naiva provincanino, ĉarma malgrandulino, kiu restas ja sola kun la spirita akompano de la steloj, «kiel larmoj falintaj el la okuloj de la nokto». Kaj, puŝata de la sorĉo de tiu magia momento, irante renkonte al amato, ŝi fordonas sin al la ondoj kaj enakviĝas malrapide. La granda rivero vualis la sekreton de tiu nekonatino, kiu aperis kun glorigita vizaĝo, kiam poste oni ŝin trovis droninta.

La tradukinto, S-ro Ludwig Goppel, laboris taktoplene por neniel difekti, en sia traduko, eĉ la fibron de unu fadeno en la punto de la milda ĉarmo, kiu envolvas de komenco ĝis fino la tutan novelon. Klara komprenebleco en la senco de ĉiu nuanco, facila konstruo de frazoj per koncizaj vortoj, karese kaj tamen ja forte impresantaj ĉe la koro de leganto — ankoraŭ pli, se legantino! — pruvas la sukceson de S-ro Goppel en tiel dankindaj klopodoj. Tiu lia evidenta sukceso estas duoble valora, ĉar ĝi ne nur atestas pri lia kapablo, sed ankaŭ pri la multaj rimedoj, kiujn Esperanto ebligas, same en prozo kiel en verso, al la veraj posedantoj de la lingvo. Granda merito, kiel dirite, en la traduko de S-ro Goppel, estas ĝia aboluta senĝeneco por flua legado. Nu... absoluta, se oni ne jam stumblus ĉe kelkaj neologismoj sen oportuna klarigo (inter aliaj: ***deprimi, frikas, gluglis*** kaj ***tablojdo,*** ĉi tiu lasta sufiĉe kurioza. Ĉar temas pri dormigilo, mi divenis, pro ia simileco kun la hispanlingva vorto ***tableta,*** ke ĝi rilatas al speco de pastelo el medikamento). Cetere, la vorto ***vaporulo,*** kun senco de ***vaporŝipo,*** invitas al diskutetoj... kiuj rapide solviĝus en la fluo de tiom multaj belaĵoj, kiuj por nia regalo, troviĝas en la arte presita volumeto, kie la eldonantoj jam promesas la aperon de plia romantika titolo en la serio.

La gratulojn por la tradukinto oni ne ŝparu, do, por la eldonejo kaj por ĉiuj esperantistaj geamantoj, kiuj certe plej rafinite perceptos kaj ĝuos la dolĉajn arpeĝojn de tiu loga libreto.

**LUIS HERNANDEZ**

**NOVA MOVADO MARŜAS** estas broŝuro havebla senkoste de «Svenska Frisksportarforbundet» (Karlbergsvagen, 14 — STOCKHOLM — Svedio)

Internacia Komitato de Sansportmovado, sveda asocio por laŭnatura vivmaniero, celanta korpan kaj animan sanon por la homoj, laŭ malnova latina esprimo ***mens sana in corpore sano,*** eldonis ĉi tiun 12-paĝan broŝuron, presita en altkvalita papero kaj klara literaranĝo. La eldonisto celas disvastigi per Esperanto sian asocian programon, «kiel reago kontraŭ nia nenatura vivado, kiu sekvis el nia malsukcesa adaptiĝo al la moderna socio kaj al la tekniko, kiuj postulas, ke ni kune vivu centmile aŭ milione en urboj, tiuj ŝtonaj dezertoj, sub psika premo de la ĝenerala rapidemo kaj la labortakto».

**NASKIĜO DE LA UNIVERSALA KREDO**

de Richard E. Lambert. Havebla ĉe «Esperanto Book Service of America» (114 W. 16 street-NEW YORK-Usono)

Ĉi tiu 8-paĝa broŝuro, privata eldono de la verkisto, por sciigi pri la universalista kredo, estas por ni — esperantistoj — pruvo, ke per la helplingvo estas legeblaj multaj kaj multaj aferoj, eksteraj al nia kutima scio. La preso estas klara kaj la lingvo facila, ĉar la broŝuro, kiel esprimas ties titolo, estas historia rakonto pri Thomas Potter kaj John Murray, fondintoj de la universala kredo.

**ERNESTO HURTADO**

**Nia literaturo estas spegulo pri la grado de kulturo de nia popolo**

**MUY IMPORTANTE.**—*Para que nuestros afiliados puedan conocerse y relacionarse entre sí, tenemos en preparación la edición de una ADRESARO, con los nombres y direcciones de todos los miembros de la Federación que hayan pagado su cuota, total o parcialmente, antes del día 30 de Abril*

## ESPERANTISTA VIVO

### GEEDZIĜO

*Niaj estimataj gesamideanoj Arquimedes Ballester kaj Trinidad Torregrosa, tre aktivaj membroj de nia Federacio kaj fervoraj pioniroj en Alcoy, ĵus geedziĝis ricevante multe da gratuloj, inter kiuj troviĝaj la niaj plej sinceraj.*

### NASKIĜO

*Nia kara amiko Ernesto Roca, nelacigebla sekretario de la pasinta Kongreso en Tarrasa, ĝojas nun pro la feliĉa naskiĝo de ĉarma filineto, kiun la cikonio donacis al li, kiel rekompencon al lia sindonema laborado. Ne necese estas diri, kiom ni ĝojas pro lia ĝojo!*

### NEKROLOGO

*Francisko Costa, modesta sed kara amiko, membro el la Valencia rondo, mortis la 9.an de pasinta Januaro pro kormalsano. Al liaj familianoj kaj multaj eksterlandaj korespondantoj ni sendas altestime la ateston de nia sincera kondolenco.*

### CONGRESOS DE ESPERANTO

7.ª Kongreso de SAT-Amikaro en Liége
**del 12 al 14 de Abril de 1952**
**Dirección: Sr-o T. BURNELLE - 46, Rue Brixhe**
**HERSTAL (Bélgica)**

## PARA NUESTRO BOLETIN

(Donativos correspondientes a FEBRERO 1952)

| | | |
|---|---|---|
| Suma anterior | 910 | Ptas. |
| Jaime Folch - Sabadell | 5 | » |
| Eduardo Larrouy - Bilbao | 10 | » |
| Martín Buscató - Barcelona | 10 | » |
| José Vigo - Martinet | 10 | » |
| Francisco García - Hospitalet de Llobregat. | 10 | » |
| Abelardo Alonso - Madrid | 3 | » |
| Roberto Calvet - Valencia | 100 | » |
| Justo Estañ - Granada | 20 | » |
| Juan Régulo - La Laguna | 10 | » |
| Antonio Pont - Valencia | 10 | » |
| Manuel Monleón - Bogotá | 10 | » |
| E. C. - Barcelona | 10 | » |
| Esperanto - Fako de la Juventud Tarrasense | 10 | » |
| Salvador Closa - Tarrasa | 10 | » |
| Baska Sporta Klubo - San Sebastián. | 25 | » |
| Félix Buisán - Palencia | 5 | » |
| José Gil - París | 90 | » |
| Guillermina Bosch - Valencia | 10 | » |
| Maruja Gascó - Valencia | 10 | » |
| Total | 1278 | » |

*¡Que siga, tan arrogante, la buena racha!...*

Ankoraŭ pli kaj pli interesa kaj nepre leginda estas
**MALGRANDA REVUO**
**LITERATURA TRIMONATA GAZETO**
**Jarabono por Hispanio: 30 ptoj.**
Landa peranto: AMADO PONS MARTORELL
**Sicilia, 217, 1.°, 2 - BARCELONO**

### ANONCETOJ

**Ni akceptas anoncetojn kiuj rilatos al nia afero. Unu peseto au unu r-k. validas por du vortoj. Tri mallongigaj literoj valoras kiel unu vorto. Aparta tarifo por specialaj anoncoj.**

Esperanto-Vojaĝklubo, en Linz, aranĝas por la 6-a de Majo 1952. letervesperon kaj poste ekspozicion, pere de la ricevita materialo. Bonvolu, do, sendi leterojn, kartojn bildflanke afrankitajn, gazetojn, kion ni rekompencos per bela bildkarto

Sendu la materialon al S-ro Max Hollinger
Gruberstrasse, 65 LINZ-Donaŭ (Aŭstrio)

S-ano Hristo Penĉef Vlaskovski, Oreŝak, Trojansko (Bulgario), dez. korespondi kun kelkaj hispan(in)oj pri ĉiuj temoj.

S-ano Ivan Georgief Minkov, Sitovo, Plovdivsko (Bulgario), same dez. koresp.

S-ro Albertino Alves de Almeida, deziras korespondi kun fraŭlinoj per Esperanto, hispana, angla, itala, franca kaj portugala lingvoj. Avenida Tereza Cristina, 73- Prado
BELO HORIZONTE, M. G. (Brazilo)

Internacia Koresponda Klubo serĉas gekorespondantojn. Skribu al la oficejo: *Japan Correspondence Club* - 10, 2-Chome, Chodo — FUSE - CITY — (Japanio)

La Esperanta Koresponda Grupo: 260, Oka - Shinmachi Hirakata - City (Osaka) (Japanio), serĉas hispanajn gemikojn.

La Sociala Organizo de la Germana Federacia Fervojo kaj la Germana Esperanta Fervojista Asocio, transpreninte la aranĝon de la 4ª IFEF-Kongreso en Lindaŭ (Lago Konstanca) de la 25ª ĝis 30ª de Majo 1952, plej ĝentile invitas la *Hispanajn Esperantistajn Fervojistojn* persone partopreni la kongreson.

**Germana Esperanta Fervojista Asocio**

OKK 4.ª IFEF - Kongreso — Museumstrasse, 39
HAMBURG - ALTONA

PERIS-G. V. MARQUÉS DEL TURIA, 28-VALENCIA

# LITERATURA KONKURSO

**OKAZE DE LA XIIIª HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO EN VALENCIA (26-27-28-29 JULIO 1952)**

Al ĉiuj samideanoj, kiuj, per prozo aŭ per verso, emas kulturi la beletron en nia internacia lingvo, Hispana Esperanto-Federacio sendas plej koran saluton, invitante ilin verve konkuri en la turniro de ĉi tiu Literatura Konkurso, kie belaj premioj atendas rekompenci la plej trafajn verkojn ricevitajn de ĉiulandaj aŭtoroj, kiuj povas partopreni laŭ jenaj reguloj:

1.ª (Verso) **Lirika poeziaĵo,** originala aŭ traduka **kun libera elekto pri rimo aŭ metriko.**

2.ª (Prozo) **Mallonga novelo,** originala aŭ traduka **kun libera elekto pri stilo kaj temo.**

La unua premio, por ĉiu el ambaŭ temoj, estos ligna ŝildo, arte tajlita, kun arĝenta tabuleto, juvele prilaborita, kie oni gravuros la nomon de la premiita aŭtoro, krom la koncerna diplomo, kiun ankaŭ ricevos ĉiuj postsekvaj premiitoj.

Ĉiuj verkoj estu nepre nepublikigitaj, en la senco, ke ili ankoraŭ ne estas senditaj al alia simila konkurso. La tradukoj devas kunporti kopion en la originala lingvo. Oni sendu la materialon, kun tre klara indiko pri nomo kaj adreso de ties aŭtoro, per rekomendita poŝto, ne pli malfrue ol la 15ª de Junio, al la ĝenerala adreso de la

**ORGANIZA KOMITATO**

**XIIIª HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO**

**(LITERATURA KONKURSO)**

**Pelayo, num. 7, 1.° — VALENCIA (Hispanio)**

***NOTO:*** *Verkoj venintaj de ekster Eŭropo estos akceptataj ĝis la 30ª de Junio.*